

# Sud-Rejna Kuriero

Januaro  
2013

## Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°49

Espace 110  
FR-68110 ILLZACH  
CCP 19684 F Strasbourg  
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel  
Postfach 178  
CH-4005 Basel  
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

Jam ni troviĝas en la nova jaro 2013 kaj samtempe liberiĝis de la festado-periodo. Decembro estas iom speciala monato, pro Kristnasko kaj la jarfinaj festo-tagoj.


Krome okazis la Zamenhof-festo, bone organizita de la frajburga grupo.

En oktobro komenciĝis la Esperanto-kursoj en Espace 110. En novembro nia grupo sukcesis partopreni samtage 2 manifestaciojn por informi pri Esperanto.

Komence en januaro ni festis la tri-reĝojn en nia kursejo, ĝi estis nia unua kunveno en la nova jaro.

Nia regiona staĝo okazos jam meze de marto 2013. Vi trovos en ĉi-tiu numero la necesajn informojn por frue aliĝi.

Krome ni deziras al vi:



Libreto de la eldonejo Impeto:  
Fabelo.trovu.com

*Feliĉan kaj sano-plenan novan  
jaron 2013*

	24.01.2013	Jarkunveno 2012 Parkrestaurant Lange Erle (provo) ek de la 20a15
Lunde	25.02.2013	Saint-Louis Babilado nomita „La Fadenó“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
	21.03.2013	Srablo en ek de la 20a15
Lunde	22.04.2013	Saint-Louis Babilado „La Fadenó“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
	23.05.2013	„Akropolis“ en Inzlingen/
	24.06.2013	Saint-Louis Babilado „La Fadenó“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“
<b>FERIOJ</b>		
Dimanĉe	25.08.2013 aŭ	01.09.2013 Ekskurso ?
	26.09.2013	Ni parolos pri la somero en ....Ek de la 20a15
Lunde	28.10.2013	Saint-Louis Babilado „La Fadenó“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
	28.11.2013	Programo en .....Ek de la 20a15
	?? .12.2013	Zamenhofa festo en Francio

**Esperanto – Societo Basel**

**Ĝenerala jarkunveno**

Ni invitas vin por jaŭdo la 24.01.2013 al la Ĝenerala Jarkunveno, en Parkrestaurant Lange Erle.  
Komenco je la 20a15

1. Bonvenigo
2. Elekto de la tagprezidanto
3. Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno 2012
4. Aliĝoj kaj ekziĝoj
5. Raportoj a) de la prezidanto
6. b) de la kasisto kaj kaskontrolantoj
7. Senŝarĝigo de la estraro
8. Elekto a) de la prezidanto
- b) de la vicprezidanto
- c) de la kasisto kaj kaskontrolantoj
- d) de la sekretario
9. Kontribuoj a) al KCE
- b) al pacmovado
- c) al junuloj
10. Proponoj: Tiujn bonvolu skribe prezenti ĝis la 14a de februaro 2013 al Esperanto Societo Basel.

Kiel kutime ni aldonas enpagilon por la jarkotizo al tiuj personoj, kiuj ne aktive partoprenas en nia rondo, la aliaj bonvolu pagi rekte al la kasisto. Anticipan dankon.  
Membro unuopa CHF 25.-

Esperante, ke vi multnombre partoprenos, ni salutas vin samideane.  
La estraro

## Zur Begrüßung gibt's ein herzliches "Saluton!"

Im Rieselfeld trafen sich Menschen aus dem Dreiländereck, um die vor 125 Jahren erfundene Kunstsprache Esperanto zu feiern.

Elkora „Saluton!“ kiel bonvenigo

*En kvartalo Rieselfeld renkontiĝis homoj el Trilandejo por festi la lingvon Esperanto, inventita antaŭ 125 jaroj.*

La esperantogrupo antaŭ preĝejo Maria Magdalena – fotis A. Grossmann



Sie sind Deutsche, Schweizer, Franzosen, Afrikaner. Auch eine Japanerin ist dabei. Die Mehrheit ist um die 60, ein paar auch erst in den Dreißigern. Sie träumen einen alten Traum: von weltweiter Verständigung in einer Sprache, die alle sprechen. 125 Jahre, nachdem Ludwig Zamenhof die von ihm erfundene Sprache Esperanto publik machte, trafen sich beim "Zamenhof-Fest" am Samstag 40 Esperanto-Kundige aus dem Dreiländereck in Freiburg. Glauben sie, dass ihre Vision wahr wird?

Es ist windig und verregnet, als die Gruppe Menschen langsam vom Rieselfeld-Markt vor dem Stadtteiltreff "Glashaus" zur Maria-Magdalena-Kirche schlendert. An der Kirchenführung nimmt nur ein

Ili estas germanoj, svisoj, francoj, afrikanoj. Ankaŭ ĉeestas japanino. La plimulto havas ĉ. 60 jarojn, kelkaj nur proksimume 30. Ili revas malnovan revon: pri monda interkompreniĝo per unu lingvo, parolata de ĉiuj. 125 jarojn post kiam Ludoviko Zamenhof publikigis sian lingvon, 40 Esperanto-spertuloj el Trilandejo renkontiĝis sabate en Freiburg. Ĉu ili opinias, ke ilia revo realiĝas?

Estas venteme kaj pluveme, kiam la grupeto de homoj lantas trans la *Rieselfelda* bazarejo antaŭ la kvartala renkontejo "*Glashaus*" al preĝejo *Maria Magdalena*. La gvidadon tra la preĝejo

Teil der 40 Feiertage teil, das Programm dauert den ganzen Tag. Plötzlich ruft jemand: "Da kommen die Franzosen!" Kurz darauf: Händeschütteln, lachende Gesichter und immer wieder der Ruf "Saluton" – das heißt auf Esperanto "Hallo". Die Gäste aus Frankreich leben in Mulhouse und Colmar, darunter sind auch Flüchtlinge aus afrikanischen Ländern.

Vor der Kirche empfängt alle Anne-Gertrud Kiefer von der ökumenischen Maria-Magdalena-Gemeinde. Ursula Niesert von der derzeit zehnköpfigen Freiburger Esperanto-Gruppe dolmetscht zwischen der Gruppe und Anne-Gertrud Kiefer, die kein Esperanto spricht.

Die Maria-Magdalena-Kirche passt zu Esperanto, findet Manfred Westermayer: "Sie steht für die Ökumene und ist eine Brücke, genau wie Esperanto, das Menschen verbindet." Darum fing er vor 30 Jahren an, die künstlich geschaffene Sprache zu lernen, die seiner Vorliebe für Systeme entgegenkam. Doch hat in der Zwischenzeit nicht längst Englisch die Brückenfunktion als Weltsprache übernommen? Das streitet hier niemand ab, und Manfred Westermayer betont: "Ich habe nichts gegen Englisch." Aber als er kürzlich Lewis C. Carolls "Alice im Wunderland" im Original las, wurde ihm wieder klar, wie schwierig zum Beispiel Wortspiele für Nicht-Muttersprachler zu verstehen sind. Beim Esperanto dagegen sind alle gleichgestellt, das schafft Neutralität. Und Esperanto lernt sich viel schneller als jede andere Sprache. Manfred Westermayer hat es sich in einem Monat im Alleingang beigebracht, bei Nicole Focke hat vor 25 Jahren sogar eine Woche Intensivkurs beim Esperanto-

partoprenas nur parto de la 40 festogastoj, la programo daŭras la tutan tagon. Subite iu vokas: "Jen la francoj!" Kaj tuj poste: mansalutado, gajaj vizaĝoj kaj ĉiam denove la voko "Saluton!" – La gastoj el Francio vivas en *Mulhouse* kaj *Colmar*, inter ili rifuĝintoj el afrikaj landoj.

Antaŭ la preĝejo renkontas ilin ĉiujn Anne-Gertrud Kiefer de la ekumena Maria-Magdalena-paroĥo. Ursula Niesert de la momente dek-kapa Frajburga Esperanto-grupo tradukas inter la grupo kaj Anne-Gertrud Kiefer, kiu ne parolas Esperanton.

La preĝejo bone konvenas al Esperanto, opinias Manfred Westermayer: "Ĝi simbolas la ekumenon kaj estas ponto ĝuste kiel Esperanto, kiu ligas la homojn." Tial li antaŭ 30 jaroj eklernis la kreitan plan-lingvon, kiu kompleksas lian amon por sistemoj. Sed ĉu ne intertempe la angla transprenis tiun pontofunkcion kiel monda lingvo? Tion ĉi tie neniu kontestas, kaj M. Westermayer emfazas: „Mi ne kontraŭas la anglan.“ Sed kiam li antaŭ mallonge legis "Alice en mirlando" de Lewis C. Carroll en la originala angla, li denove rimarkis, kiom malfacilas kompreni la vortludo por nedenskuloj. Ĉe Esperanto – aliflanke – ĉiuj havas la samajn ŝancojn, tio kreas neŭtralecon. Kaj Esperanto multe pli rapide estas lernebla ol iu ajn alia lingvo. Manfred Westermayer lernis ĝin aŭtodidakte en unu monato. Por Nicole Focke antaŭ 25 jaroj sufiĉis

Zentrum im schweizerischen Jura genügend. Inzwischen lebt sie nahe Lörrach und mischt mit ihrem Mann bei der Basler Gruppe mit.

Auch dort und bei den Kollegen in Oberkirch sind wie in Freiburg die Gruppen auf etwa zehn Aktive geschrumpft, die sich mal mehr, mal weniger regelmäßig treffen. Doch deswegen ist noch längst keine Resignation angesagt. "Mit Englisch macht man seinen Weg, mit Esperanto macht man Freunde", fasst Engelbert Sester aus Oberkirch seine Überzeugung zusammen, die zum Lebensgefühl aller Esperanto-Fans passt: Ihnen geht's nicht um globale berufliche Karrieren, sondern um Zwischenmenschliches, sie sind offen für Menschen in und aus aller Welt.

Viele übernachten bei ihren Reisen überwiegend bei ihnen bis dahin unbekanntem Esperanto-Kollegen und nehmen ebenso selbstverständlich fremde Gäste auf.

Manfred Westermayer ist so durch Russland, China und den Iran gereist, Engelbert Sester durch Litauen und Polen, Ursula Niesert durch Brasilien. Dabei erleben sie: In Ländern, deren Sprachen weltweit wenige Menschen sprechen, ist Esperanto deutlich beliebter als in Deutschland.

Doch selbst hier sind trotz der schrumpfenden Ortsgruppen durchaus auch Jüngere fasziniert. Die aber, erzählt Julia Noe, mit 33 Jahren derzeit die Jüngste in der Freiburger Gruppe, sind kaum sichtbar, sie tauschen sich vorwiegend im Internet aus und fahren zu internationalen Treffen.

eĉ nur unu semajno da intensa lernado ĉe Esperanto-centro en svisa ĵuraso. Intertempe ŝi vivas kun sia edzo apud Lörrach kaj intermiksiĝas en la Bazela grupo.

Ankaŭ tie kaj ĉe la kolegoj en Oberkirch samkiel en Freiburg la grupoj ŝrumpiĝis al ĉ. dek aktivuloj, kiuj renkontiĝas pli aŭ malpli regule. Sed tio tute ne estas kaŭzo por rezignacio: „Per la angla oni faras sian karieron, per Esperanto oni faras amikojn“, tiel Engelbert Sester el Oberkirch resumas sian konvinkon, kiu kongruas kun la vivosento de ĉiuj Esperantanoj: ili ne alstrebas tutterajn profesiajn karierojn, sed interhomecon, ili malfermas por homoj en kaj el la tuta mondo.

Multaj dum siaj vojaĝoj tranoktas ĉe ankoraŭ nekonataj Esperantanoj kaj same memkompreneble akceptas fremdajn gastojn. Manfred Westermayer tiel vojaĝis tra Rusio, Ĉinio kaj Irano, Engelbert Sester tra Litovio kaj Pollando, Ursula Niesert tra Brazilo. Tiel ili spertis: en landoj, kies lingvon parolas nur malmultaj homoj mondscale, Esperanto estas klare pli ŝatata ol en Germanio.

Sed eĉ ĉi tie – spite al malgrandiĝantaj lokaj grupoj – ankaŭ junuloj estas fascinitaj, sed ili (tiel rakontas Julia Noe) kun siaj 33 jaroj momente la plej juna en la Frajburga grupo – apenaŭ videblas, ĉar ili ĉefe komunikas per interreto kaj vizitas renkontiĝojn internaciajn.

Kiel ĉiu-jare, raporto estas la okazo trarigardi la aktivecojn de la ĵus pasinta jaro :

En januaro okazis nia Jarkunveno en Riehenring en Basel.

En februaro ni partoprenis al la « Fadeno » en Saint-Louis, en la restoracio "La Poste", kie ni agreable babilis.

En marto la kunveno ne okazis pro malbona vetero.

En aprilo ni kuskusumis en agrabla rondo denove en Saint-Louis, en la restoracio "La Poste" kaj bone diskutis.

En majo ni ŝanĝis nian kutimon kaj kunvenis ankaŭ kun kelkaj gastoj el Francio en la restoracio "Akropolis" en Inzlingen, kie ni kviete povis babili, ĉar jaŭde tiu restoracio ne estas tiel plen-plena kaj tiel ni povis havi propran angulon.

En junio estis la tria renkontiĝo de la „Fadeno“ denove en la restoracio „La Poste“ en Saint-Louis. Tie estas agreable babili kviete en sufiĉa granda rondo, eĉ se la restoracio mem estas iomete brua.

En aŭgusto ni devis rezigni pri nia ekskurso pro grandega varmeco.

En septembro ni parolis en nia kunveno en Riehenring pri la ferioj kaj la estonta programo.

En oktobro ni kunvenis kun niaj samideanoj el Saint-Louis kaj cirkaŭaĵo en la restoracio "La Poste" en Saint-Louis por agrabla babilado .

En novembro ni detale planis la novan

programon kaj diskutis pri la situo de nia kunveno, intertempe ne plu tiom taŭga por niaj plej maljunaj membroj. Ni devas vidi por nova solvo.

En decembro ni festis la Zamenhofan feston en Freiburg in Breisgau, kun sufiĉe granda grupo de preskaŭ 40 personoj. Unu grupo komencis kun vizito al la Krisnasko-Bazaro dum la dua kunvenis en la kvartalo Rieselfeld. Tie oni antaŭe purigis la uzatan akvon de la urbo, pro tio la nomo Rieselfeld, sed kiam tiuj terenoj ne plu estis necesaj, oni prenis ilin por konstrui tute novan kvartalon, kies duono havas socialajn loĝejojn kaj la alia havas konvenciajn sed ankaŭ ekologiajn domojn.

En la centro de la kvartalo estas la preĝejo "Maria Magdalena", konstruita en 2002. Mez-katolika, mez-protestanta sed povas ankaŭ esti unuigita al unu sola preĝejo. Post intervjuo de ĵurnalisto, ni veturis al la salono de la frajburga grupo.

Tie estis ankoraŭ kafumado kaj interesaj prelegoj . La vespero finiĝis per bongusta vespermanĝo. Dankon pro tiu agrabla akcepto.

Ĉar nia grupo ne estas tiel granda, ni decidis partopreni 4 foje jare al la monataj "Fadenaj"-kunvenoj en la restoracio "La Poste" en Saint-Louis, ĉar por plej multaj tiu solvo bone taŭgas.

Por la monataj kunvenoj en Basel, ni serĉas taŭgan kunven-lokon por la grupo. Loko kiu estu relative facile alirebla kaj kie la necesejo ne estu ie ajn en la kelo.

Eĉ se ni ne plu estas tiel granda rondo valoras flegi la grupon kaj la rilatojn, por ke estu almenaŭ unu Esperanto alir-punkto en Basel.

Nicole Bérout

**73a Regiona Staĝo de Esperanto  
la 15 / 16 / 17-ajn de marto 2013  
En la Domo Centre d'Accueil  
55220 BENOÎTE-VAUX**

**Turismado al Saint-Mihiel**

23 km 30 mn

**Provizora Programo:**

**Vendrede 15-an de marto 2013**

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti la preĝejon de la abatejo de Benoîte-Vaux
- 19a30 Vespermanĝo
- 21a45 Malfermo de la knajpo.

**Sabate 16-an de marto 2013**

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado al Saint-Mihiel
  - Du tre konataj skulptaĵoj de Ligier-Richier
  - muzeo pri religiaj artaĵoj
  - altranga biblioteko : bela loko, raraj libroj
  - domo de la reĝo
  - kvartalo de la 18-a jarcento
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de la alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, C, kaj E.
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero kun Marie LIEBY
- Knajpo

**Dimanĉe 17-an de marto 2013**

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, C, kaj E
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Ĝenerala asembleo de GEM.  
Groupe des Espérantistes Meusiens
- Poste: disigo

**Prelegoj**

Asocio kun tiel impona LIBROSERVO nepre promociu la originalan Esperanto-literaturon.

Proe ni invitas vin al la prelegoj de Anne JAUSIONS, kiu prezentos al vi niajn originalajn

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :**

François Xavier GILBERT  
33, rue Louvière -  
FR - 55190 VOID-Vacon

**Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de:**

**GEM 27 32 X Nancy**

**Internaciaj ĝiroj al**

**GEM IBAN:**

**FR54 2004 1010 1000 0273 2X03 175**

**BIC: PSSTFRPPNCY**

**Por Germanio al nia peranto:**

je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen

**KURSOJ**

**A: Komencantoj (débutants)**

Cours pour débutants par Ginette Martin. Elle apportera le matériel adéquat.

**C: Progresantoj :**

Paroliga kurso tute en esperanto.  
Gvidas Edmond Ludwig

**E: Seminario:**

Prelegoj de Anne JAUSIONS , kiu prezentos niajn plej eminentajn originalajn literaturaĵojn kaj ties aŭtorojn.

**Por pliaj informoj :**  
 benoite-vaux@orange.fr>  
 Tel. 03.29.89.82.15

**Daŭre aktualigitaj informoj:**  
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.



Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

ALIĜOJ	Antaŭ la 1-a de februaro 2013	Ekde la 1-a de februaro 2013
<b>Ĉef-aliĝanto jam abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio</b>	20 €	25 €
<b>Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilon"</b>	35 €	40 €
<b>Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)</b>	15 €	20 €

RESTADO			
<i>kategorio</i>	<i>litotukoj</i>	<i>ĉambro</i>	<i>por 1 persono kaj 1 nokto</i>
<b>hotel-komforta ĉambro</b> kun maten-manĝo duŝo kaj necesejo en la ĉambro	inkluzive	individua	28 €
		por paro=1 lito	21 €
<b>normala ĉambro</b> kun maten-manĝo duŝoj kaj necesejoj troviĝas en la koridoro,	inkluzive	individua	20 €
		kun 2 litoj	17 €
<b>kolektiva ĉambro</b> kun maten-manĝo	5 eŭroj	6 aŭ 8 personoj	12 €
<b>kompleta restado = verspermanĝo + tranoktado + tagmanĝo</b>			28 €
<b>1 manĝo kun 1 trinkaĵo</b>			12 €
<b>Simpla manĝo en korb</b>			7 €



# Aliĝilo por la 73a Regiona Staĝo de Esperanto en Benoîte-Vaux la 15/16/17ajn de marto 2013

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					
4					

Adreso

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la doku-  
mentoj disdonataj dum la staĝo (signu)

Mi preferas vegetaran  
manĝon (signu)

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: €  
per ĉeko  per ĝiro  al GEM 27 32 X Nancy  
per internacia ĝiro  al nia peranto en Germanio   
Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

R e z e r v a d o j	Nombro da manĝoj kaj tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
	Tagmanĝo			
	Vespermanĝo			
	hotela ĉambro 1-lita			
	hotela ĉambro por paro			
	Normala 1-lita ĉambro			
	Normala 2-lita ĉambro			
	Preferata kunloĝant(in)o :			
	Kolektiva ĉambro			
	Lito-tukoj (se ne inkluzivitaj)			
	Kompleta restado			
Sumo pagenda =				

# En Illzach: Bédéciné kaj en Ungersheim: Foiro pri "Ekologio kaj justa komercado"

En la semajnfino de la 17a kaj 18a de novembro 2012, nia grupo sukcesis partopreni en du manifestacioj, nome en Illzach, kie okazis Bédéciné kaj en Ungersheim ĉe foiro pri Ekologio kaj justa komercado.

Dank'al la bonvolemo de pluraj el niaj membroj, ni sukcesis organizi samtempan deĵoradon por tiuj du tagoj en ambaŭ lokoj.

Bertrand  
kaj  
Simone  
en Illzach



Skribas Bertand:

Ĉi-jare denove Mulhouse-Esperanto havis budon ĉe "Bédéciné" en Espace 110, Illzach.

Tie deĵoris sabate la 17an kaj dimanĉe la 18an de novembro, Simone, Andreo, Jacques, Yves kaj Bertrand.

Ni prezentis la nun haveblajn bildstriojn en Esperanto. Tiuj-ĉi atentigis la vizitantojn, ke nia lingvo eĉ skribeblas, sed ĉu oni ankaŭ povas paroli ĝin? *Bonvolu eldiri frazon!* Ne miru, deĵorantoj aŭdas kelkfoje tiajn demandojn.

Sed ofte ankaŭ nia lingvo vekas sinceran scivolemon. Kaj refoje mi konstatis, ke ankaŭ kontraŭulaj argumentoj povas esti instruaj kaj spert-akiraj por ni informantoj.

Eĉ se la fina bilanco ne aperigas novan lernanton, la graveco de tiuj informbudoj ŝajnas unua-rangajn. Kaj se iam, el niaj diversaj lokaj agadoj devus postresti nur ununuran, ĝi nomiĝus **inform-agado**.



En Ungersheim deĵoris sabate aŭ dimanĉe Edmond, Roberto, Simone kaj Andreo.

Ĉe tabulo Edmond aŭ Roberto kelkfoje iniciatis etan kurson pri la lingvo, kiu kaptis la atenton de la vizitantoj.

Diversaj libroj kaj Esperanto-revuoj estis prezentitaj inkluzive la 3-lingva libro pri la katedralo de Strasburgo.

Krome ni jam povis disdoni la



novan kalendareton por la jaro 2013.

Ni esperu, ke nia agado vekis iom da scivolemo ĉe la vizitantoj kaj eble ankaŭ intereson.

Andreo

Edmond ĉe la budo en Ungersheim

## KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2013-2015

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono
2013	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2014	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagebla al

André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM  
Ĉekojn je la nomo de: Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg.

## Zamenhof-festo en Frajburgo la 15an de decembro 2012

Laŭ-vice niaj Zamenhof-festoj okazas en la tri landlimaj landoj, Svislando, Germanio, Francio. Ĉi-jare la grupo de frajburga transprenis la organizanton.

La organizantoj proponis du grupojn. La unua povis jam alveni en la mateno por viziti la Kristnasko-bazon. La dua grupo rendezuis en la kunvenejo de la grupo, ĉe Treffpunkt.

De tie ni veturis per tramo al la kvartalo Rieselfeld. Tie kuniĝis ambaŭ grupoj, tiam ni ampleksis pli ol 40 partoprenantojn.

Ni kune vizitis tre modernan preĝejon Sankta Magdalena. Ĝi estas uzata por 3 religioj, kelkfoje aparte, sed ankaŭ eblas okazigi ekumenan di-servon. Tiam eblas grandigi la ĉefan halon per ŝovado de grandaj beton-muroj. La tuto estas tre sobra sen ornamaĵoj kun moderna koncepto.

Dum nia vizito ĵurnalisto el Badische Zeitung sekvis la grupon, intervjuis iom da partoprenantoj kaj fotis. Ŝia raporto en la ĵurnalo montras, kiom ŝi estis malbone informita pri la lingvo. Kiom da ŝablonaj demandoj estis faritaj. Feliĉe Manfred trovis la taŭgajn argumentojn.




La urbo Freiburg, per tramo ni veturas al kvartalo Rieselfeld



Vizito al preĝejo Sankta Magdalena

Je la 16a ĉiuj troviĝis en la kunvenejo "Treffpunkt". La organizantoj regalis la partoprenantojn per kafo, teo kaj bungustaj kukoj.

Manfred pri Mazingira



Poste ni povis ĝui mallongajn sed interesajn prelegojn. Manfred montris fotojn pri la afrikaj vilaĝoj Mazingira, kie la frajburga grupo subtenas diversajn projektojn, ĉefe pri akvo-pumpiloj.

Attila rakontis pri la kvartalo Riesefeld, kie li nun loĝas. Ni ĵus vizitis tie la preĝejon, sed pro iom da pluvo, ne la kvartalo-mem.

Ursula havis la taskon retrorigardi en la lastaj 30 jaroj de la Frajburga grupo. Aperis multaj konataj vizaĝoj, terure pli junaj.

Julia estas tre legema, tial ŝi aliĝis al "Librokruciĝo". Interkonsente aŭ hazarde eblas transdoni aŭ interŝanĝi jam legitajn librojn al alia persono. Tia-cele ekzistas retejoj kaj ankaŭ librotransdonejoj por faciligi la plu-vivon de la libroj.



Julia klarigas pri libroj

Je la 18a, la kunvenejo transformiĝas al manĝejo. Bongustaj manĝoj estas proponitaj, vegetaraj, ĉinaj pladoj kaj diversaj viandoj.

Tiel en agrabla etoso finiĝas la Zamenhof-festo de la jaro 2012.



Partoprenantoj okaze de vizito al preĝejo Sankta Magdalena

Fotoj kaj teksto de Andreo

# Tri-reĝa festo en Espace 110

sed malaperis unu fabo



Ĉu Roberto instruas Esperanton aŭ argumentas pri kampuĉao??

*La 8an de januaro 2013 ne okazis nia kutima kurso por progresantoj, sed kiel ĉiu-jare, tiam ni kunvenis por festi la 3 reĝojn. Venis kelkaj membroj el nia asocio, lernantoj de nia kurso. Krome ni refoje povis akcepti gastojn el apuda Germanio, nome Konrad Gramelspacher, konata pro lia barbo, kaj Paulo Finus, fakulo pri botaniko, el proksima Müllheim.*

*Pluraj boteloj estis metitaj sur la tablon. Alzaca vino, ŝaŭmvino, cidro kaj suko. Ilin volonte kunportis iuj partoprenantoj. Nia asocio prizorgis la migdalo-tortojn, 4 entute.*

*Kiam la unua torto estis sufiĉe varma kaj la glasoj plenigitaj, ni kune tostis por la nova jaro, por la sukceso de nia asocio kaj de Esperanto.*



*Post formanĝo de la unua torto ekestis neniu reĝo aŭ reĝino. Mistero: ĉu torto sen fabo aŭ kaŝita fabo.*

*Nur poste la dua torto ni eksciis, ke Maŭrice kaj Simone trovis la fabon. Tuj poste ankaŭ Andreo trovis en sia tortopecon fabon.*

*Jen la 3 gereĝoj estis trovitaj.*

*Dum la tuta vespero regis simpatia etoso kaj ankaŭ diskutoj pri estontaj agadoj de nia grupo: Verdaj fadenoj, membrokunveno, festo por la fino de la lerno-jaro. Post la Zamenhof-festo en Frajburgo estas la vico de nia grupo ĝin organizi ĉi-jare.*

*Krome daŭre funkcias Esperanto-kursoj por progresantoj en Espace 110. Jacques iniciatos kurson por komencantoj en la kadro de Mondcivitanoj en Mulhouse mem.*

*Restas tamen mistero, ĉar entute estis 4 tortoj. Kiu trovis la 4an fabon. Ĉu ni konkludu ke "la 4a fabo malaperis".*



## Verdaj Fadenoj en Mulhouse kaj Saint-Louis

Jam okazis 3 verdaj fadenoj en septembro, oktobro kaj novembro. En decembro ni paŭzis.

La venonta verda fadeno okazos la 28an de januaro en Mulhouse, ĉe la kutima kafejo, 7, rue du Printemps. Laŭ propono de Hans Meier el Bazelo, kiam la vetero estos pli favora, li proponas organizi iun verdan fadenon en Germanio proksime al la landlimo. Ni informos vin per nia dissendo-listo kaj nia retejo.

La celo estas uzi Esperanton por amike babili sen krokodilado.

La lokoj estas:

En Mulhouse:	en la kafejo:	7 rue du printemps
En Saint-Louis:	en restoracio de la Poste,	10 rue de Huningue.

Provizore:

jen la venontaj datoj:	28an de januaro 2013 en Mulhouse
	25an de februaro 2013 en Saint-Louis
	25an de marto 2013 en Mulhouse
	29an de aprilo 2013 en Saint-Louis
	27an de majo 2013 en Mulhouse
	24an de junio 2013 en Saint-Louis

**Okaze de tiaj renkontiĝoj eblas pruntericevi librojn de nia biblioteko, sed unue sendante mesaĝon al nia dissendolisto.**

# Nia Kalendaro 2013

<p><b>Januaro 2013</b></p>	<p>8  15 - 22 - 29  28</p>	<p>Ni kune festos la 3 reĝoj en Espace 110 anstataŭ nia kutima kurso de la 18a30 ĝis la 20a Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a aŭ de la 15a ĝis la 16a30. Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps" 7 strato du printemps 68100 Mulhouse</p>
<p><b>Februaro 2013</b></p>	<p>12  5 - 12  25</p>	<p>Membro-kunveno en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15 ĝis la 16a30 Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio de la Poste, 10 rue de Huningue en Saint-Louis.</p>
<p><b>marto 2013</b></p>	<p>5 - 12 - 19  15-16-17  25</p>	<p>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15 ĝis la 16a30 regiona staĝo en Benoîte Vaux– Informoj en ĉi-tiu numero Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps" 7 strato du printemps 68100 Mulhouse</p>

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

**<http://mulhouse.esperanto.free.fr>**

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

**[mulhouse-esperanto@yahogroupes.fr](mailto:mulhouse-esperanto@yahogroupes.fr)**

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.





Akvareloj  
reproduktitaj  
kun la afabla  
permeso de  
S-ro  
Georges  
RATKOFF.

Mi eniras la aŭtunon de mia vivo.  
Bela sezono ĉu ne ?  
Restas tempo por belaj sunoj  
kaj la espero de belaj someroj.

Ami la tempon kiu pasas.  
Ne timi vidi ĝin halti.  
Posedi la forton daŭre rideti kaj vidi  
la bonan flankon de la homoj kaj de la aĝoj.

La aŭtuno estas la tempo de la rikoltoj,  
sed ankaŭ de preparado al la vintro.  
Mi volus ankoraŭ gustumi, lerni,  
malkovri la mondon kaj miri.

Ne forgesi travivi la nunon,  
Forlasi la estintecon, ne timi la morgaŭon.  
La sezonoj similas al la vivo,  
ili pasas kaj revenas.

Estas tempo ŝanĝi la vivo-ritmon,  
transdoni la taskojn, por ke la jam  
konstruitaj aferoj daŭre plene utilu.  
Mi iros ankoraŭ labori por aliaj feliĉoj.



**Bernard, kiu ĉi-jare emeritiĝos,  
deziras al vi Bonan Jaron 2013.**